
# *Japanio festas 400 jarojn de amikaj rilatoj kun Kubo.*




Per du grandaj koncertoj en la fortreso de Sankta Karlo de La Cabaña kaj la teatro Mella de Havano dum la 22-a kaj 23-a de februaro, la japana ambasadejo ?i-urbe festos la 400 jarojn de amikaj rilatoj al Kubo.
La japana triopo Hogaka Yakuta Oyama, formita de talentaj junaj muzikistoj de tradiciaj kaj originaj instrumentoj japanaj, sin prezentos en la malnova urba placo Sankta Francisko, kune kun la kuba ensemblo de David Álvarez.
La japanaj artistoj ofertos senpagan prezenton anka? en la havana teatro Mella kie ili interpretos, interalie, latinamerikan muzikon aran?itan por tiu ?i speciala evento.
En tiu ?i jaro oni rememoras la alvenon en 1814, de la samurajo Hasekura Tsunenaga gvidanta diplomatian mision survoje al Romo, por starigi rilatojn kun Meksiko kaj renkonti?i kun la Papo en Vatikanurbo.
Okaze de la XXIII-a internacia librofoiro Kubo 2014, Japanio havas standon kie ekspozicias librojn kaj realigas plurajn aran?ojn kun la publiko, kiel ateliero pri origamio kaj pri la uzo de tradiciaj kostumoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/14821-japanio-festas-400-jarojn-de-amikaj-rilatoj-kun-kubo

# Radio Habana Cuba